

la naska fasko

Numero sep
2009-07-07
mardo

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Kio okazos hodiaŭ?

★ **1:30 ptm:** Ekskurso al La Jolla
Kie: rendevuu antaŭ *Asante*
Ni iros buse al la centro de la urbo-
parto La Jolla, kie troviĝas luksaj
butikoj, belega golfeto kun amuzaj
fokoj, pelikanoj, ktp...

Busoj vojaĝas inter La Jolla kaj UCSD
po kvar fojoj hore, do ni povos reveni
iam ajn. Ne estas firmaj planoj; ni iros
simple por esplori laŭplaĉe.

Kiel eviti la junulojn?

Ne *niajn* junajn NASKanojn, komprene-
ble—sed tiujn aĉajn amasegojn da junuloj,
kiuj regule plenŝtopas la manĝejon!

Danke al Andreo, ni nun scias ke la longaj
vicoj ĉe *Café Ventanas* aperas nur dum la
jenaj mallongaj tempoj:

7:45 – 8:00 atm
12:00 – 12:15 ptm
5:15 – 5:30 ptm

La Pano Nia

de César VALLEJO (1892-1938)
Tradukis Franklin MONTENEGRO

Oni trinkas la matenmanĝon... Humida tero
de tombejo kiu odoras je amata sango.
Vintra urbo... La mordanta trairo
de ŝarĝoĉaro kiu ŝajnas ke ĝi trenas
emocion de fasto katenigita!

Oni dezirus frapi ĉiujn pordojn,
kaj demandi pri kiun mi ne scias; kaj sekve
vidi la malriĉulojn, kaj, silente plorante,
disdoni pecetojn de freŝa pano al ĉiuj.
Kaj elrabi al riĉuloj ilajn vitejojn
per la du sanktaj manoj
kiuj dank' al lumfrapo
flugis ekmalnajlitaj el la Kruco!

Matenaj okulharoj, vi ne ellitiĝu!
Nian ĉiutagan panon donu al ni,
Sinjoro...!

Ĉiuj miaj ostoj estas malpropraj;
eble mi rabis ilin!
Mi venis por doni al mi tiun kiu eble estis
asignata por aliulo;
kaj mi pensas ke, se mi ne estus naskiĝinta,
alia povrulo trinkus tiun ĉi kafon!
Mi estas malbona rabisto... Kien mi iros!

Kaj je tiu ĉi malvarma horo, kiam la tero
odoras kvazaŭ homa polvo kaj estas tiom
trista,
dezirus mi frapi ĉiujn la pordojn,
kaj petegi al mi ne scias kiun, pardonon,
kaj fari por li pecetojn de freŝa pano
ĉi tie, je la forno de mia koro...!

César VALLEJO estis *perua poeto kiu naskiĝis
en Santiago de Chuco en 1892 kaj mortis en
Parizo en 1938. En 1918 li eldonis sian
unuan poemaron: "La Nigraj Heroldoj", kie
oni klare povas trovi efikon de modernaj
influoj. Tiu ĉi verko ankaŭ montras tion, kio
estas konstanta eco de liaj poemoj: solidare-
co de la poeto kun la suferado de homoj, kiu
iĝas batakrio kontraŭ la socio.*

La Bona Reĝo Kiu?

de Lee MILLER

Dum prelegis Doroteo HOLLAND, men-
ciigis statuo de iu Reĝo Wenceslas en
Prago. Ĉiuj usonanoj verŝajne konas la
nomon de tiu reĝo, pro tio ke ĝi rolas en
konata kristnaska kanto. Sed Spomenka
demandis al mi, “Kial ŝi parolis tiel pri iu
Reĝo Wenceslas?” Mi povis klarigi pri la
kanto, sed efektive sciis nenion pri la reĝo
mem. Kaj mi kredas ke apenaŭ iu en
Usono povus facile klarigi kiu li estis, kaj
pri kio la kanto temas. Ĉu vere estas ia
rilato kun Kristnasko?

Jen bildo (sube) de la statuo ĉe Placo
Wenceslas, en Prago.



© prague.net

Kaj jen la kanto, en Esperanto-traduko:

Staris Reĝo Wenceslas' (Good King Wenceslas)

Verkis (angle): John Mason NEALE, 1853
Esperantigis: Gabriel D. LEWIS

1. Staris Reĝo Wenceslas
Vintra en vespero;
Ĉie neĝon vidis li,
Altan sur la tero.
Jen aperis malriĉul'
Per lunlumo hela,
Kolektante lignon en
Frosto la kruela.
2. Reĝo: “Ho paĝi', jen kamparan'!
Diru lian nomon:
Diru kie povos ni
Trovi lian domon?”
Paĝio: “Malproksime li, Sinjor',
Loĝas sur la monto,
Apud rando de l' arbar'
Kaj la sankta fonto.”
3. Reĝo: “Vidon kaj viandon ni
Portos en la domon:
Ne hodiaŭ la malsat'
Premos tiun homon.”
Do la reĝo kaj paĝi'
Iris en vespero
Tra la brua, frosta vent',
Akra la vetero.
4. Paĝio: “Nokto pli malluma nun,
Pli sovaĝa estas;
Timon sentas mia kor',
Forto ne plu restas.”
Reĝo: “Vidu, kie paŝas mi,
En la signojn paŝu,
Por ke vintra vent' al vi
Furiozon kaŝu”.
5. Post la reĝo la paĝi'
Zorge do paŝadis:
En la signoj de l' sanktul'
Varmon li trovadis.

Ho Kristanoj, se al vi
 Estas ia riĉo,
 Helpu al la senhavul';
 Benos vin feliĉo.

6. Ni memoru, amikar',
 Pri la malriĉuloj
 En Kristnaska tempo, kaj
 Estu donemuloj:
 Ĉar la paco de l' homar'
 Estas nia revo,
 Amo al aliaj ja
 Estas nia devo.

“La legende bonfara reĝo, kiun tiu ĉi teksto prikantas, estas pli ofte nomata, en la historio, Duko Vaclavo de Bohemujo, la sankta patrono de Bohemujo; li mortis en 729, murдите de sia frato Boleslavo; lia propra festotago estas la 28-a de Septembro. La festo de s-ta Stefano (la unua Kristana martiro, Agoj ĉap. 7), je la 26-a de Decembro, estas tradicia tago en pluraj landoj por donaci al malriĉuloj, almozuloj, aŭ aliaj personoj ekster la propra familio. En Anglujo oni nomas ĝin ‘Kestuma Tago’, origine pro tio, ke je tiu tago la anglaj preĝejoj kutimis malfermi siajn almozkestojn kaj disdoni la enhavon al la malriĉularo.”

(Traduko kaj klarigo el la retejo de ROS' Haruo, “La Lilandejo”/Himnaro Cigneta.
<http://www.geocities.com/cigneto/thctxt/s/starisreg1.html>)

Monda krizo: nur pripensoj

de *Drissa Flayoro DIAKITE*

Ĉi tiu historio okazas en vilaĝo kiu ricevis multajn turistojn sed en tiu ĉi tempo de monda krizo, neniu turisto venas.

Iam hotelisto ricevas iun kiu donas nur bileton de 100 USD. Tuj la hotelisto kuras por doni la bileton al sia kamarano kiu lastatempe ne plu kuraĝas doni viandon kaj atendas monon.

Kiam la kamarano ricevas la bileton, li tuj kuras por doni la bileton al la putino por favoriĝi siajn venontajn amor-propojn, ĉar lastatempe ŝi ne plu konsentus se oni pagus rekte. Kiam la putino ricevis la bileton, ŝi tuj kuris por pagi la hoteliston, ĉar lastatempe la hotelisto ne faciligis ŝian laboron.

Intertempe kiam la putino metis la bileton flanke kaj iomete babilis kun la hotelisto, la turisto pensis ke la hotelo ne estis komforta kaj decidis ŝangi hotelon, do li venis por serĉi lian monon kaj prenis kun la hotelisto lian bileton.

En nia vilaĝo oni povas konkludi ke neniu elpensis, neniu gajnis, neniu ankoraŭ perdis.

La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; Hoss helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... kion ajn. Sendu viajn materialojn perrete al [<nask.esperanto@gmail.com>](mailto:nask.esperanto@gmail.com) aŭ portu ilin piede al Asante#127.

Kiuj ni estas? Kion ni farus?

de Shai MOR

La problemo ŝajne estas, ke homoj ekster nia komunumo pensas pri ni same kiel ni pensas pri idistoj.

Mi imagas idistojn kiel strangulojn—duonfrenezajn, izolitajn kaj disigitajn homojn (same kiel senformajn asteroidojn kiuj preterpasas tra la malplena, malluma spaco).

Ĉu vi volas esti idisto? Kial ne? Laŭ mi, en mortaj lingvoj ĝojo estas netrovebla, ĉar sen parolantoj ne eblas ĝui. Verŝajne ambaŭ estas oksimoroj, ĉu ne?

E-o estas speciala; ĉu aliaj lingvoj ne estas specialaj? Ĝi ankaŭ estas riĉa; ĉu la aliaj lingvoj havas malpli? Ĝi estas interhoma; ĉu la aliaj ne interligas siajn uzantojn?

Ĉu ni esperantistiĝas paralele al aliaj flankoj de nia realeco (kiel ĉiu gento pretervivis senrilate al aliaj, sename krom la kutimaj najbaraj kvereloj)? Ĉu E-o povas disfali la murojn de malamo inter la popoloj, refari disigitajn homojn al fratoj? Por sukcesi, la lingvo devas havi gravecon al nia vivo, ĉar ju pli la lingvo rilatas al nia vivo, des pli bone ĝi efektiviĝas en ni, mense kaj vive.

La defio estas ĉe niaj piedoj, kiel ni volas esti, pensi kaj agi. Laŭ miaj spertoj, ne pensi estas la pli facila maniero por agi. Sed por lingve kreski, mi ne konas alian rimedon ol trapensi la vortojn, la parolajn same kiel la legatajn.

E-istoj, se vi legas ĉi tiun artikolon mi do gratulas vin, verŝajne vi jam saltis, paŝegis ekster la terposedaj lingvoj. Luku, bataladu kontraŭ la banalaĵojn.

Kioma estas la horo nun? Bonvolu ne saluti min kiel kutime per “saluton”, “bonan matenon/vesperon”, ĉar E-o ebligas al ni disvolvi kaj dispecigi la ŝablonojn de la ĉiama parolo. Imagu la eblecojn!

Do rompu la cerbajn katenojn por gajni vian liberecon, la veran. Jam estas temp’.

Limeriko de falsaj amikoj numero 3

de anonimulo

La afektaj ŝirmistoj
Kaj la plumpaj libeloj
Defiis unu la alian konfekcii
Kalumnion por la ekspozicio
En la agro de la riboj.



Ĉu Micah prepariĝas ekskursi por vidi fajraĵojn aŭ por esplori kavernon? (Foto danke al Franklin MONTENEGRO-RODAS.)